


Bulgara ESPERANTISTO





Parto de la partoprenantoj en la aranĝo en Jambol (paĝo 14)

Foto: Lasto Nikov



La partoprenantoj en la jubilea celebros en Ĥaskovo (paĝo 9)

En la lasta momento:

GRAVEGA NOVAĴO

La 14an de marto en Moskvo estis fondita

ASOCIO DE LA SOVETAJ ESPERANTISTOJ

Sinceran gratulon!

ENHAVO

* * * Aleksandro Stambolijski . . .	1
* * * Deklaro de la Centra Estraro de BEA pri la ĉina agreso en Vjetnamio	3
* * * Договор за съвместна работа между БЕС и народните читалища	3
Dimitro Mutuŝev. Intervjuo kun Pejo Perbenliev	6
Penka Papazova. Ne foriru! Bulgario.	6
N. Dubrava. Grivica	6
V. Aleksandri. La serĝento	7
Stefan Sokolov. La vojevodo el Znepole	7
* * * Solena celebros de 75-jara jubileo	9
Nikola Uzunov. 75 jaroj de la E-societo en Ĥaskovo	10
Anton Antonov. Va VARE-79	11
Petro Angelov. E-renkontiĝo en Dimitrovgrad	12
Rosica Georgieva. Esperanto-recitalo en Pazarĝik	12
* * * Pluraj E-kursoj tralalando	12
* * * Plenkunsido de la Sofia DE de BEA	13
Evgeni Georgiev. IV Landa Mezlernejana E-Konferenco kaj Revuo de la E-Kanto kaj Artparolo	14
* * * Premiitoj en la Revuo	14
* * * 64a Universala Kongreso de Esperanto	15
* * * Delegacio de UEA akceptita de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO	15
* * * Kiu estas Amadou-Mahtar M'Bow?	16
* * * „Koncize“ (mallongaj E-novaĵoj el eksterlando)	16
Georgi Miĥalkov, Ŝehrie Efendieva. Paco (kanto)	III
Stojan Kostadinov. Pensoj de eminentaj bulgaroj naskitaj en marto	III
* * * Forpasis Eŭgeno Salnikov. Forpasis Boris Veliĉkov	IV

Sur la Ĥkovrilpaĝo:

Aleksandro [Stambolijski (portreto)

Redakta komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, Ljube BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krĉstu KARUCIN, Haim LEVI.

Korektis: Rajna Konstantinova
Sofio. p. k. 66 Tel. 31-00-29

**ALEKSANDRO STAMBOLIJSKI (1879—1979)**

Jam cent jaroj ekde la naskiĝo de Aleksandro Stambolijski — eminenta gvidanto de la Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo (BZNS), arda demokrato-respublikano.*

Naskita en vilaĝana familio, Stambolijski ligis sian tutan vivon kun la sorto de la bulgaraj kamparanoj. En la tempo, kiam li ekstaris sur la politika areno, la bulgaraj kamparanoj kune kun la ceteraj laboruloj suferis pezan ekspluatadon kaj senrajtigon fare de la reganta burĝa klaso kaj la monarko Ferdinand. Enirinte tute juna la vicojn de BZNS Stambolijski bone komprenis, ke la laborkamparanoj ne povas venki sen politika organizaĵo. Sub lia influo kaj gvidado BZNS transformiĝis en politikan organizaĵon de malriĉaj kaj meze riĉaj kamparanoj. Sed pro la korporacia principo, sur kiu konstruiĝis la organizaĵo, ĝin penetris ankaŭ multaj riĉaj, politike reakciaj vilaĝanoj kaj urbanoj. Tial en la Unuiĝo ĉiam manifestiĝis du tendencoj. Stambolijski apogis la progreseman tendencon.

Aparte populara fariĝis Aleksandro Stambolijski pro sia batalo kontraŭ la monarko Ferdinand kaj lia militarisma politiko. Post la unua nacia katastrofo en la dua Balkana Milito (1913) li havis la kuraĝon deklari antaŭ studentoj: „Kiu kulpas pri la katastrofo? . . . Mi respondas senhezite. Se oni serĉus respondecon, reĝo Ferdinand devas esti pendumita!“ Kiam Ferdinand decidis fleti la landon en la Unuan Mondmiliton, Stambolijski avertis, ke se la reĝo faros tion, li respondos „per sia kapo“. Pro tio milittribunalo kondamnis lin je dumviva mallibereco.

Estas konata fakto, ke dum militjaroj la popolamasoj pli rapide kreskas kaj maturiĝas, pli rapide komprenas sian staton kaj interesojn. En la fronto kaj en la postfronto de la Unua Mondmilito la indigno kaj malkontento akriĝis. En septembro 1918 eksplodis la tiel nomata Soldata Ribelo. Malsataj, suferantaj, la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj en soldatmanteloj ekmarŝis al la ĉefurbo por renversi la burĝan registaron. Stambolijski kaj lia kunbatalanto Rajko Daskalov ekstaris fronte al la ribelo. Oni proklamis respublikon. Sed la ribelo estis frakasita kruele.

Aleksandro Stambolijski amis forte la rusan popolon — nian liberiginton el la 500-jara otomana jugo. En 1907 li salutis la unuan rusan revolucion. En oktobro 1917, kiam la rusaj laboristoj kaj kamparanoj venkis, li skribis: „La plej grava en la nuntempo estas la rusa revolucio. Ĝi havas duoblan utilon por la mondo: unuflanke ĝi por ĉiam likvidis la plej kruelan carismon. . . Kaj aliflanke ĝi metis en tagordon la demandon pri la paco. Sed la rusa revolucio havas ankaŭ alian utilon por la homaro, kiun neniu supozas. Tio estas la spi-

* BZNS — bulgarlinva prononco BeZeNeSe.

rito de radikalaj ŝtataj kaj sociaj reformoj. La rusa revolucio portas la triumfon de la demokratio. Ĝi portas bonon al la laborhomaro. . .“

Post la nacia katastrofo en la Unua Mondmilito BZNS venis al la ŝtatpotenco, unue koalicie, poste memstare, ĉiam frunte kun Stambolijski. Lia kabineto komencis efektivi demokratiajn reformojn en la ekonomia, socipolitika kaj kultura vivo: agraran reformon, monopolon de la komerco kaj eksporto de cerealoj, progresivan imposton super la enspezoj, imposton super la akciaj societoj, okupiĝantaj pri komerco, industrio, min-ekspluatado, asekurado ka., ekspropriigon de la urba grand-proprietio; ĝi enkondukis ĝeneralan labordevigon (por konstruado de vojoj, pontoj, irigaciaj sistemoj ka.), konfiskis la proprieton de la neleĝe riĉiĝintoj dum la milito, organizis juĝon kontraŭ la kulpanoj pri la dua nacia katastrofo ktp. Ĝi arde subtenis la kooperativan movadon en la lando.

En sia ekstera politiko la registaro de Stambolijski tenis sin je la principoj de paca kunlaboro kun ĉiuj landoj, inkluzive Sovetan Rusion.

Per siaj demokratiaj leĝoj kaj reformoj la registaro de Stambolijski forte tuŝis la interesojn de la granda burĝaro, kiu kompletis kaj la 9an de junio renversis la leĝe elektitan registaron. Aleksandro Stambolijski estis kruele torturita kaj mortigita.

La registaro de Stambolijski falis, ĉar BZNS havis eraran komprenon — ĝi kredis, ke nura agrarana partio povas sola havi la regpotencon en siaj manoj, sen aŭ eĉ kontraŭ la laborista klaso. Same ĝi ne likvidis la ekonomian forton de la ekspluatanta burĝa klaso, ne likvidis la monarkion, ne eksigis la reakciajn oficirojn de la armeo ktp. En siaj lastaj tagoj, dum la rezisto kontraŭ la puĉistoj, Aleksandro Stambolijski mem venis al la ĝusta kompreno, ke la korporacia principo ne taŭgas, ke memstara agrarana regado ne povas esti longedaŭra, ke la sava vojo estas tiu de firma unueco inter laboristoj kaj kamparanoj.

La fidelaj adeptoj de Aleksandro Stambolijski plenumis lian testamenton. Ili aktive kaj fidele partoprenis en la postaj bataloj de la Unueca Fronto dum la Septembra Ribelo (1923), en la Popola Fronto (1936—38), en la Patrolanda Fronto (1942—44), ĉiam kontraŭ la kapitalistoj kaj monarkofaŝistoj en nia lando. Tiel la laborpopolo de Bulgario sub la batalstandardo de la Patrolanda Fronto, sub la gvido de la Komunista Partio kaj per la decida helpo de la nevenkebla Soveta Armeo falingis la kruelan monarkofaŝisman diktaturon je la 9. IX. 1944 kaj malkovris novan eraon en la 13-jarcenta historio de Bulgario — la eraon de socialismo.

Instruita de la historio, BZNS en la kondiĉoj de nova, libera Bulgario faris la decidan paŝon: ĝi forĵetis la korporacian principon kaj la iluzion pri memstara regado kaj transiris al la klasa principo. Nun ĝi estas klasa politika organizaĵo de la laborkamparanoj, kiu donas sian kontribuon en la konstruado de socialismo.

Kun sento de profunda estimo, kune kun la tuta bulgara popolo, ankaŭ la bulgaraj esperantistoj celebras la 100an datrevenon de la naskiĝo de la eminenta filo de la bulgara laborpopolo Aleksandro Stambolijski. Sed por tio ili havas ankoraŭ unu, pli specialan motivon. En 1921 j. la registaro de Stambolijski enkondukis Esperanton en la realajn gimnaziojn. Pri tio la bulgaraj esperantistoj ĉiam memoras, pri ĝi fieras. La bulgaraj esperantistoj sankte gardas la testamenton de Stambolijski pri la bulgara-soveta amikeco, pri nerompebla unueco inter komunistoj kaj agraranoj, pri amikeco kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj, pri paco kaj sekureco en la mondo.



FOR LA ĈINAJ AGRESULOJ EL VJETNAMIO!

DEKLARACIO

de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio

Kun granda kolero kaj indigno la bulgaraj esperantistoj eksciis pri la invado de la ĉina armeo en la teritorion de Socialisma Respubliko Vjetnamio. Tiu insida atako laŭ faŝista maniero skuis ĉiujn honestajn homojn en la mondo kaj ĝojigis nur la reakciulojn. Ekzistas neniu fakto pri ia ajn provoko de la vjetnama popolo kontraŭ ĉina teritorio. Sed estas aliaj faktoj. Ili parolas pri senĉesa premo de Ĉinio kontraŭ Socialisma Respubliko Vjetnamio. Tiu premo komenciĝis tuj post la senglora fiasko de la usona agreso en Vjetnamio. Ĝi estas farata pro la ambicio de la ĉinaj partia kaj ŝtata gvidantaroj trudi la hegemonion de Ĉinio super Sudorienta Azio kaj pro la fideleco de Socialisma Respubliko Vjetnamio al la socialismaj idealoj, al la socialisma komunismo kaj Sovetunio — la potenca pilastro de la paco kaj socialismo en la tuta mondo. Kulmino de tiu premo estas la armita agreso de Ĉinio. Per tiu abomena milito, kiun Ĉinio iniciatis, per la barbara mortigado de vjetnama virinoj, infanoj kaj maljunuloj kaj per detruado de la vjetnamaj urboj kaj vilaĝoj la ĉina gvidantaro montris al la tuta mondo, ke ĝi havas nenion komunan kun la paco, la humanismo kaj la internaciismo. Ĝi pli intime aliĝis al la monda imperiismo, al la plej nigraj fortoj de la internacia reakciularo. La barbara atenco kontraŭ la libero, suvereneco kaj sendependeco de Socialisma Respubliko Vjetnamio estas indigna rompo de ĉiuj kaj ĉiaj internaciaj juraj kaj moralaj normoj, ĝi subfosas la pacon kaj sekurecon en la mondo, portas malfeliĉon ankau al la ĉina popolo mem.

En la nomo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj — sinceraj batalantoj por amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj, por paco kaj sekureco en la mondo — la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kune kun la tuta bulgara popolo kolere ekkrias: "For la manojn disde Vjetnamio! Senprokrastan eltiron de la ĉina armeo el la lando de la heroo kaj liberama vjetnama popolo! Vivu la fronto de la paco kaj socialismo en la tuta mondo!"

CE de BEA

Telegramoj proteste kontraŭ la ĉina agreso venis en la redakcion de la jarkunveno de Bulgara E-Kooperativo, de la Konferenco de Nordbulgara E-Junularo en Varno (11. III. 79), de multaj E-societoj.

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ* КОМИТЕТ ЗА КУЛТУРА

ДОГОВОР

за съвместна работа между БЕС и народните читалища

Между българското есперантско движение и народните читалища в нашата страна съществуват добри традиции на сътрудничество и съвместна прогресивна народополезна дейност. В периода на капиталистическото и монархофашистко господство есперантистите бяха едни от най-активните читалищни дейци и обратно — в народните читалища се оформяха пламенни есперантисти. В много селища тъкмо читалищата ставаша средища на оживена есперантска дейност, като в техните салони и помещения се уреждаха есперантски курсове, устройваха се публични събрания и сказки за международния език есперанто и за работата на българските есперантисти, организираха се есперантски вечери и забави, изложби и пр.

Задачите на Българския есперантски съюз и народните читалища са близки: да работят за издигане на културното равнище на трудещите се, за повишаване на тяхната социалистическа съзнателност, за възпитанието им в дух на пламенен патриотизъм и социалистически интернационализъм, на международна солидарност и приятелство, на сътрудничество и сигурност между народите, за мир на земята.

Решаването на тези важни и отговорни задачи може да получи нов, реален подтик чрез активизиране на съвместната дейност между Българския есперантски съюз и народните читалища. За тази цел Централното ръководство на Българския есперантски съюз и дирекцията Териториални комплекси „Култура“ при Комитета



за култура смятат за необходимо:

1. Народните читалища и Българският есперантски съюз (неговите окръжни и дружествени ръководства) да включват редовно в своите планове организирането на съвместни мероприятия като: чествувания на национални празници, беседи, прожекции и др., за да се издига идейното и културното равнище на техните членове и на останалите граждани. За всяко съвместно мероприятие да се приема отделен план.

2. Народните читалища и есперантските дружества да уреждат съвместни колективни посещения на театрални и оперни спектакли, концерти, изложби и др., да организират

съвместни изleti и екскурзии до важни културно-исторически паметници, до живописни места и природни забележителности, до големи обекти на социалистическото строителство.

3. Народните читалища и есперантските дружества да организират съвместно курсове по международния език есперанто, събрания за популяризиране на езика и пр.

4. Съвместната дейност на двете организации да се отразява в техните печатни органи — сп. „Читалище“ и сп. „Български есперантист“.

За постигане на горните цели

I. Народните читалища се задължават:

Да съдействуват на есперантските дружества при провеждане на някои по-масови прояви от тяхната културно-просветна и идейновъзпитателна работа и им предоставят своята материална база.

2. Да откриват есперантски курсове, както и да съдействуват на курсовете, организирани от есперантските дружества, с предоставяне на подходящи помещения за занимания.

3. Да се абонират за органа на Българския есперантски съюз сп. „Бъл-

гарски есперантист“ и по възможност за други есперантски издания — сп. „Пацо“ („Мир“), „Сциенца мондо“ (Научен свят), „Есперанто“, в. „Херолдо де Есперанто“ (Вестител на есперанто) и др., като ги поставят в читалните.

4. Постепенно да създават есперантски сбирки към своите библиотеки, като се осигуряват книги чрез закупуване по преценка на ръководството на читалищата и чрез дарения от страна на есперантистите.

II. Есперантските дружества се задължават:

1. Да организират участието на своите членове в мероприятията на читалищата и особено в тези, които са запланувани като съвместни мероприятия.

2. Да станат колективни членове на съответните народни читалища.

3. Да участвуват в библиотечните съвети (комисии) на читалищата и да привличат нови читатели за читалните библиотеки.

4. Да се абонират за сп. „Читалище“.

5. Да съдействуват на народните читалища за разширяване на тях-

ната международна дейност, за обмяна на опит с културни учреждения и институти в чужбина и пр.

6. Да участвуват в лекционната работа на читалищата чрез изнасяне на лекции и беседи за международния език есперанто и по други въпроси, свързани със задачите и целите на българското есперантско движение.

7. Да разгласяват по всички възможни за тях начини есперантските курсове при читалищата — чрез индивидуална и групова, устна и писмена агитация.

8. Да осигуряват подходящи лек-



тори за есперантските курсове при читалищата.

9. Да полагат грижи за методиче-

Председател на Българския
есперантски съюз: *Хр. Горов*

ското ръководство на преподаването
на есперанто в курсовете при чита-
лищата.

Главен секретар на
комитета за култура: *Ст. Ганев*

Ĉi-supre ni donis bulgarlingve la tekston de Kontrakto pri Kunagado inter BEA kaj la Popolaj Legejoj (Kulturdomoj). Tio estas grava paŝo al plivastigo de E-agado sur nova kampo — en la Popolaj Legejoj, institucio tre populara kaj amata de la bulgara popolo.

INTERVJUO

kun prof. arkitekto **Pejo BERBENLIEV** —
vicprezidanto de la Komitato de Kulturo



Demando: *Kamarado Berbenliev, vi, kiel reprezentanto de la Komitato de Kulturo, partoprenis en la laboro de la 34-a Kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu okazis pasintjare en Veliko Târnovo. Ĉu vi dividus kun ni viajn impresojn pri tiu internacia junulara forumo?*

Respondo: Mi ne konas Esperanton, pro kio mi tre bedaŭras. Precipe post kiam mi estis atestanto, kiel bonege dum la kongreso la kunvenintaj kelkcentoj da gejunuloj el diversaj landoj kaj rasoj parolis en unu komuna lingvo kaj interkompreniĝis mirinde bone. Kaj la plej rimarkinda estis tio, ke ili ĉiuj emociiĝadis pri tuthomaraj humanaj ideoj kaj povis ilin rekte dividi inter si.

Demando: *Post viaj kontaktoj kun esperantistoj el diversaj landoj, ĉu vi opinias, ke Esperanto povas esti uzata por interŝanĝo de kulturaj valoroj kaj informoj pri la problemoj de la kulturo?*

Respondo: Kategorie jes. Kiel ekzemplon mi montros la konversacion, kiun mi havis kun la gvidantoj de la kongreso dum la koktelakcepto. Helpe de aliaj lingvoj kaj interpretistoj la koktelo nerimarkite transformiĝis en konversacion pri la problemoj de la literaturo, arkitekturo, arto, kaj ĉio estis tiel interesa, ke ni ne eksentis la forpason de la tempo — pli ol du horojn. Ni interparolis, kompreneble, ankaŭ pri la problemoj de la nuntempa kulturo. Estus ja ankoraŭ pli interese kaj utile, se ankaŭ mi povus paroli en Esperanto.

Demando: *Dum la jaro 1979, deklarita kiel Internacia Jaro de la Infano, kiujn iniciatojn de la Komitato de Kulturo vi konsideras indaj esti vaste popularigataj eksterlande ankaŭ pere de la Internacia Lingvo?*

Respondo: La Internacia Jaro de la Infano por ni, en Bulgario, estas multsignifa ankaŭ pro tio, ke ni iniciatis specialan aranĝon — Internacian Infanasembleon „Standardo de la Paco“. En monato aŭgusto ni bonvenigos estontajn pentristojn, muzikistojn, poetojn. Ilia nombro estos eble 400 aŭ 600, tio ne gravas, el multaj landoj. La lingvo estos granda obstaklo por rapida interkompreniĝo — multe pli facile estus, se la infanoj sciis Esperanton.

Kion oni popularigu? Eble, antaŭ ĉio, ke tiu ĉi mondo apartenas al la infanoj, kaj ili havas rajton ĝin defendi por vivi en paco; ke la homo havas la destinin ekkoni la mondon, kreadi en ĝi kaj plibeligi ĝin; ke en Bulgario vivas bonegaj kaj talentaj infanoj kaj ili bonvenigos kun ĝojo kaj multe da korvarmo siajn samaĝulojn, kiuj venos en nian patrolandon.

Demando: *Kiajn rekomendojn vi adresus al la Bulgara Esperantista Junularo, por ke ĝi diskonigadu per Esperanto la atingojn de nia lando en la sfero de la kulturo?*

Respondo: Pere de Esperanto ili donu al la infanoj en aliaj landoj la eblojn ekkoni nian landon, la kondiĉojn, ĉe kiuj kreskas

la bulgaraj infanoj, nian historion kaj nuntempon; kaj ili ankaŭ priskribu al siaj korespondantoj la kulturajn festojn, monumentojn ka., kiuj, laŭ sia kolorriĉeco kaj specifa karaktero, ĉiam estas renkon-

tantaj kun granda intereso de alilandanoj. Niaj sukcesoj sur la kultura kampo estas evidentaj kaj ili povus esti interesaj ankaŭ por la esperantistoj el la aliaj landoj.

Interjuis: Dimitro Mutuŝev

POEZIO kaj BELETRO



Penka Papazova

NE FORIRU!

Ne foriru,
mia amo! . . .
Restu en mi,
en miaj revoj,
en miaj pensoj,
en miaj faroj . . .
Estu por mi ĝojo,
estu por mi tago,
per kiuj ĉio komenciĝas!
Aliiĝis mi,
sed portas mi vin
en mia koro
kiel unu komencon,
kiel unu senfinon,
laŭ kiuj
mi devas pasi.

N. Dubrava

GRIVICA*

Vi, Grivica, heroa tero,
kaj vi, ho niaj sudaj fratoj,
ĝis nun memoras vi, mi scias,
herojn tiujn tagojn, kiam
l'aer' odoris ne je rozoj,
sed fum' sin sternis sur la tero,
la akra fum' de la batalo!

Bulgaroj, rusoj kaj rumanoj —
dum la batal' ni marŝis kune.
La kant' pri nia heroeco
eterne sonos kaj instruos!

**INTERNACIA ASOCIO „MONDA TURISMO“, TURISTA SOCIETO „JUNDOLA“ —
VELINGRAD, ESPERANTO-SOCIETO „STOJU KALPAZANOV“ — VELINGRAD**

aĝable invitas vin partopreni en:

**I. INTERNACIA TURISTA RENKONTIĜO „TRA MONTOJ KAJ VALOJ“
2—9 de junio 1979**

**II. INTERNACIA SEMINARIO POR PACO KAJ AMIKECO TRANS LIMOJ
1—10 de septembro 1979**

Ambaŭ aranĝoj estos en la luksa turista domo „Kislovodsk“.

*Venu por ĝui la belaĵojn de la montoj Rila, Pirin kaj Rodopi, la bonefikojn de la pinaero, la kuracajn mineralakvojn, la bulgaran sunon kaj gastamecon!
Detalajn informojn: Manol Colev, 4600 Velingrad, Bulgario.*



LA SERĜENTO*

Serĝent', vundita grave, ekiris vojreturne
kaj al si mem senvoĉe li jenajn vortojn flustris :

„Pro sufokiĝ' kaj laco la kruroj min doloras,
la kuglovundoj akraj turmentas min kaj sangas. . .“

Ĉu li el tomb' ekiris al sia patrolando ?
Nur en okuloj liaj briladis lum' netera. . .

Li marŝis tiel, pala, kaj ŝprucis lia sango,
li ĝemis kaj lamentis, la mondon buŝ' malbenis . . .

Sur uniform' ŝirita kaj polvkovrita brusto
ordenoj du briletis samkiel stelradioj . . .

Subite sur la vojo ĉe la kurbiĝ' proksima
soldatkolon' aperis en densa vic' gvardia.

La rusa kolonelo, en luktoj blankiĝinta,
ekstaris ĉe l'serĝento. La regimento haltis.

La kolonel' demandis : „Ĉu vi ĉe Pleven estis ?
Kaj kie ormedaloj ornamis vian bruston ?“

„Ĉe Grivica . . . — responde serĝento kapon klinis. —
Konkeris ni l'reduton. . . “ — modeste li raportis.

La komandant' spontane per mano honorgestis,
kaj lia voĉ' ekstremitis : „Honoron, regimento!“

Eklamis la serĝento plu kun vunditaj kruroj.
La rusoj staris tiel, tenante la fusilojn

kaj kun admir' flustrante : „Hero' li estas vera !“,
al Pleven tuj ekmarŝis en hirta batalordo.

* La versaĵojn de N. Dubrava kaj V. Aleksandri (rumanaj poetoj) esperantigis Radka Ruĵanova

Stefan Sokolov

LA VOJEVODO EL ZNEPOLE

(rakonto pri mia avo)

La granda kaj komforta buso glitis sur la asfalta vojo, kaj la veturado per ĝi estis vera plezuro. Iu el la antaŭaj sidlokoj ekkantis konatan kaj amatan kanton. La ceteraj ĥore refrenis: „Esperanto estas la lingvo por ni!“

La ekskursantoj estis esperantistoj aŭ amikoj de Esperanto, kiel la kamarado sidanta apud mi. Ĉiuj estis en bonega humoro kaj veturis por ekkoni pitoreskan angulon de nia patrolando.

La buso portis nin ĉiam okcidenten.

Ni estis jam en Trân. Kun tiu ĉi malgranda kaj apudlima urbo ligas min multaj belaj rememoroj el mia infanaĝo. Jen la rivero Erma! Kiom-

foje mi banis min en ĝi! Elirinte el la urbo Erma serpentumas inter arbariĉaj deklivoj por atingi sian majestatan verkaĵon skulptitan dum jarmiloj — la faman „ĵdrelo“ (kanjonon). Rektaj kaj altaj rokoj, inter kiuj bruas kaj ŝaŭmas la rivero. Tri horojn ni restis ĉi tie kaj kontemplis tiun ĉi miraklon de la naturo. Poste nia buso revenigis nin al Trân kaj de tie denove ekflugis okcidenten tra la bukla kaj ebena Znepole. Ĉiuflanke ĉirkaŭas ĝin montoj, sur kies krestoj troviĝas la limpostenoj de najbara Jugoslavio. La monumento-ostgardejo de la pereintaj partizanoj, troviĝanta apud vilaĝo Slišovci, estis la ekstrema punkto de nia ekskurso. Kiam la afabla ad-

ministranto de la bonege aranĝita muzeo eksciis, ke ni estas esperantistoj — kia agrabla surprizo! — li mem ekparolis en Esperanto. Li rakontis al ni pri la bataloj de la anti-faŝistoj el la regiono de Trân, gvidataj de la legenda Slavčo Trânski.

Antaŭ nia enbusiĝo mi emociite ekrigardis okcidenten. Pluen estis neeble veturi. Tute proksime troviĝis la limo kaj trans ĝi, malantaŭ la monto Vârtop, la bulgara vilaĝo Groznatovci, naskiĝloko de mia avo Simo Sokolov. Ĉi tie estis naskita ankaŭ la pioniro de la bulgara Esperanto-movado Miloslav Bogdanov.

— Pri via avo mi ofte parolas al la ekskursantoj, — diris al mi ĉe la adiaŭo la administranto de la muzeo.

Kiam la buso ekveturis, mia amikokunvojaĝanto ekdeziris, ke mi rakontu ion pri mia avo. Kaj mi komencis. . .

Kiel vi aŭdis, li naskiĝis en vilaĝo Groznatovci. Dum lia infanaĝo tiu regiono ankoraŭ ĝemis sub la otomana jugo. Li kun doloro aŭskultis la parolojn de siaj parencoj kaj samvilaĝanoj pri la libera vivo en najbara Serbio kaj eksopiris vidi la vastan mondon. . . Iun tagon grupo de masonistoj el la vilaĝo ekiris al Serbio, kaj Simo sekrete postsekvis ilin. Kiam ili sufiĉe malproksimiĝis de la vilaĝo, la kuraĝa knabo aperis antaŭ ili kaj plorante petegis, ke oni prenu lin kun si. La masonistoj akceptis lin, kaj li komencis helpi en ilia laboro. Sed granda estis la deziro de la knabo lerni. Tial li komencis viziti gimnazion en Beogrado, samtempe laborante ĉe riĉaj familioj. Poste la junulo enmatrikuliĝis en la Beograda Supera Lernejo. La preĝeja estraro de Trân kaj la episkopo de Loveĉ helpis la malriĉan studenton.

Dum la tuta tempo de sia studado Simo ne ĉesis pensi pri sia sklavigita patrolando kaj eklaboris por ĝia liberigo. Amata loko por li estis la domo

de la granda bulgara revoluciulo kaj verkisto Ljuben Karavelov, kiu tiutempe loĝis en Beogrado. Simo aliĝis al la oficiraj kursoj de la Supera Beograda Lernejo, korespondis kun la bulgaraj revoluciuloj el Bukureŝto, partoprenis la provizoran komitaton de la bulgaraj elmigrintoj en Beogrado, sekrete vizitis sian naskiĝregionon en Bulgario.

La frakaso de la Aprila Ribelo ĵetis la „hâŝojn“ (elmigrantojn revoluciulojn) en Bukureŝto kaj Beogrado en grandan angoron. Sed la eksplodo de la serba-turka milito revivigis iliajn esperojn. En Serbion venis helpe rusaj oficiroj. Serbaj trupoj kaj bulgaraj volontuloj trapasis la limon. Kune kun la taĉmentoj de maljunaj kaj spertaj bulgaraj vojevodoj batalis kun sia taĉmento ankaŭ la juna Simo.

La milito finiĝis malsukcese por Serbio, sed baldaŭ la rusa armeo trapasis Danubon por liberigi la bulgaran popolon el otomana jugo. Kiel miloj da aliaj bulgaroj ankaŭ Simo metis sin je dispono al la rusa komanda korpo. Ĉar li jam estis konata el la serba-turka milito, oni sendis lin denove en Serbion kun la tasko skolti la situon de la turkoj ĉe la limo kaj ribeligi la loĝantaron en la okcidentaj regionoj de Bulgario.

Decembro 1877.

Pleven estis kapitulacinta. Dum vintraj ŝtormoj kaj nekredeblaj malfacilaĵoj la bravaj rusaj soldatoj, helpataj de la bulgaroj, trapasis la Balkanon, proksimiĝis al Sofio. Ĉe la okcidenta limo ankaŭ ne estis trankvile. En la stabon de la serba kolonelo Horvatoviĉ estis venintaj delegitoj el Trân-regiono. Grandaj amasoj de turkoj kolektiĝis por bruligi Trân kaj neniigi ĝian loĝantaron. La kolonelo vokis Simon Sokolov, servantan ĉi tie laŭ rusa ordono, kaj klarigis al li la situacion.

Jam la saman nokton Simo kun siaj kamaradoj ekiris. Ili portis nur





Simo Sokolov

280 fusilojn kaj 22 kestojn da kartoĉoj. Apud vilaĝo Vrabĉa, proksima al

Trân, la juna vojevodo disdonis la armilojn kaj formis tri taĉmentojn, kiuj ekiris en diversaj direktoj. Kun sia taĉmento Simo direktiĝis okcidenten kaj disbatis la turkojn ĉe monto Vlasina. Tiu ĉi venko kuraĝigis la bulgarojn el la regiono kaj la nombro de la ribeluloj atingis 6000. Ili antaŭenmarŝis suden kaj sub la komando de Simo kaj la maljuna vojevodo Avo Iljo sieĝis la urbon Kjustendil. En tiu momento venis la rusoj. Ĉe la renkontiĝo kun siaj frattoj-liberigantoj la bulgaroj el la okcidentaj regionoj manifestis grandegan ĝojon. Sed ili estis ankaŭ fieraj. Ĉar armitaj per fusiloj, bastonoj kaj ĉiuspeca malnova armilaro ili ne atendis la liberon kun krucigitaj manoj, sed faris ĉion laŭ siaj fortoj kaj ebloj por la frakaso de siaj multjarcentaj sklavigintoj.

ORGANIZA VIVO

SOLENA CELEBRO DE 75-JARA JUBILEO

La 17-an de decembro 1978 en Ĥaskovo okazis solena kunveno lige kun la 75-a datreveno de la fondiĝo de E-societo en la urbo. Por la solenaĵo en la Distriktan Sindikatan Domon venis pli ol 250 personoj: membroj de la societo, civitanoj, e-istoj el 20 urboj, elstaraj agantoj de la kultura kaj socia vivo en Ĥaskovo, lernantoj. Ĉeestis reprezentantoj de la DE de BEA, ankaŭ la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov.

Post la enporto de la societa standardo kaj la plenumo de la esperantista himno „La Espero“ la prezidanto de la societo inĝ. Nikola Uzunov faris raporton pri ĝia 75-jara vivo kaj agado.

La vicurbestro Nikola Pilev anoncis la decidon de la Urba Soveto honori la societon per la arĝenta blazono de la urbo kaj diplomo. Li distingis per la ora insigno de la urbo Georgi Idakiev — multjaran prezidanton de la E-societo kaj de la DE, kun grandaj meritoj por la firmigo de la E-movado en Ĥaskovo, kaj per arĝenta insigno la E-veteranojn Luka Vâlĉanov kaj Mihail Elenov.

La prezidanto de BEA Ĥristo Gorov salutis la societon-jubileulon kaj en la nomo de la Centra Estraro honoris per la ora, arĝenta kaj bronza insignoj de la asocio 25 elstarajn aktivulojn de la societo. Multaj salutparoladoj estis faritaj de la ĉeestantaj gastoj, reprezentantoj de la DE kaj de E-societoj el la lando. Kelkaj prezentis ankaŭ donacojn. Estis ricevitaj saluttletoj kaj telegramoj de e-istoj el 14 landoj.

Post la solena parto okazis riĉa literatura kaj muzika programo, kiun prezentis infanoj kaj lernantoj e-istoj, la gasto-artisto el la Sofia Muzikteatro Prodan Prodanov k.a.

Posttagmeze la gastoj vizitis kaj trarigardis muzeojn kaj ekspoziciojn en Ĥaskovo.

Lige kun la jubileo estis presitaj multkoloraj jubileaj poŝtkartoj, kalendaretoj, kovertoj kaj leterfolioj, kolora afiŝo, 16-paĝa broŝuro. Grandan sukceson ĝuis la aranĝita jubilea ekspozicio de fotoj, bildoj, poŝtkartoj, kovertoj, gazetoj ka. Dum tuta semajno antaŭ la celebrazo kaj ankoraŭ du semajnojn post ĝi la ekspozicio allogis la rigardojn de miloj da civitanoj.

75 JAROJ DE LA E-SOCIETO EN ĤASKOVO

(El la jubilea raporto)

La unua E-societo en Ĥaskovo estas fondita en 1903. Sed la Internacia Lingvo penetris pli frue en la urbon. Jam antaŭ 1900 la instruisto socialisto Krâstju Sivriev ellernis E-on kaj komencis korespondi kun eksterlandaj e-istoj.

Organizita E-movado en Ĥaskovo komenciĝis en 1903. Ĝia iniciatinto estis Vasil Tenĉev, skribisto en la urba komunumo. Vigla kaj scivolema junulo, li ellernis E-on verŝajne aŭtodidakte. Ĝuste li konvinkis siajn amikojn Dimo Miĥajlov, Miĥail Maĉev, Georgi Kolarov kaj Petro Nikolov ekposedi E-on kaj fondi E-societon. Ili luis ĉambron en hotelo „Juĥna Bâlgarija“, pendigis nigran tabulon sur la muron kaj komencis entuziasme lerni sub la gvido de Tenĉev. Baldaŭ al la grupo aliĝis ankaŭ Ilija Miĥajlov, Bojan Serafimov, Boris Kacarov, Panju Filev ka. Al la novefondita E-societo ili donis la nomon „Radio“.

En la sekva jaro unu el la fondintoj — Petro Nikolov — parolis publike en la Urba Ĝardeno pri la neceso de internacia lingvo kaj pri la esenco de E-o. Rezulte de tio al la societo aliĝis novaj 20 personoj — metiistoj, laboristoj, komercistoj, intelektuloj, iuj eĉ kun siaj familioj. „Radio“ ekvivis aktive. Ĝi havigis al si verdan standardon, komencis organizi E-kursojn, aranĝi renkontiĝojn, kunvenojn, amuzvesperojn, kiuj okazis en la salono de popola legejo „Zarja“.

De 1908 ĝis 1912 ĉe la societo funkciis teatra trupo, gvidata de Jordan Jordanov kaj Vasil Paraskov. Oni preparis kaj prezentis la dramojn „Ivanko“, „Borislav“ ka.

Pri la amasa vizitado kaj sukceso de la societaj amuzvesperoj bone rememoras eĉ nun la pli aĝa filino de Vasil Tenĉev — Katerina, jam 75-jara, loĝanta en Sofio. Tiam 5—6-jara knabineto ŝi deklamis kaj kantis en E-o akompanate per violono de sia samaĝulino Nedjalka Simeonova, la eminenta poste bulgara violonistino kaj muzikpedagogo.

La militoj Balkana kaj Inter aliancana (1912—1913) kaj poste la Unua Mondmilito ĉesigis la agadon de la E-societo. Vasil Tenĉev translokiĝis en Kârĝali. Tamen la E-vivo en Ĥaskovo ne mortis. En 1919 Krâstju Sivriev organizis E-kurson en la klubejo de la socialistoj. Du el la junuloj, lernintaj en tiu kurso — Stefan Kadiev kaj Delĉo Ĥaralanov — fariĝis poste aparte fervoraj E-agantoj.

En la lernojaro 1923/24 en la gimnazio de Ĥaskovo estis fondita E-grupo de lernantoj el la superaj klasoj, en kiu aktivis Bojdju Gospodinov, Velĉo Velĉev, Vâlĉan Ĥristo-

zov ka. La lasta poste elkreskis kiel granda e-isto kun multaj kontaktoj en la lando kaj eksterlande.

En 1925 Stefan Kadiev, jam juna kuracisto, revenis al sia naskiĝurbo Ĥaskovo kaj restis labori ĉi tie. Entuziasma idealisto-arda adepto de abstinenco, vegetarismo, turismo, soifanta populutilan sociagadon, li plurajn jarojn obstine kontribuis por la kultura evoluo de la urbanoj. D-ro Kadiev aktive propagandis la amatan E-on ankaŭ per prelegoj, ĵurnalinformoj, gvidado de kursoj. Inter la kursanoj troviĝis ankaŭ greko, juna kudristo. Post sia reveno en Greklandon li daŭrigis la E-agadon kaj nun li estas unu el la gvidaj personoj de Helena E-Asocio. Tio estas s-ano Gergios Miggas, kun kiu la e-istoj de Ĥaskovo havas amikajn kontaktojn.

Dum la jardeko antaŭ la Dua Mondmilito E-o en Ĥaskovo havis multajn adeptojn inter la membroj de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS) kaj la Laborista Partio. Per E-o ili riĉrezulte kontaktis kun komunistoj kaj aliaj progresemaj homoj tra la mondo.

Post la militista faŝista puĉo en 1934 j. multaj aktivuloj de la Komunista Partio kaj de aliaj progresemaj organizaĵoj en Ĥaskovo kaj la distrikto estis arestitaj. La malliberejo en la urbo plenpleniĝis. Sed la politikaj malliberuloj ne ĉesigis sian idean kaj klerigan laboron. Ili fondis diversajn rondetojn, organizis kursojn. Estis organizita ankaŭ E-rondeto, kiu tre vigle laboris.

Post sia liberiĝo multaj remsanoj (anoj de RMS) kaj komunistoj, malgraŭ la forta faŝista teroro, daŭre okupiĝis pri E-o. Tiu-tempe elstaras la figuroj de la junaj e-istoj Ivan Arakliev, Tenĉo Hubenov, Dimitro Kanev, Dinko Atanasov, Todorka Paunova, Ivan Rajkov, Aleksandro Zagorski k.a. Dum la malegala kaj peza batalo kontraŭ la faŝismo kelkaj el ili pereis — T. Hubenov, T. Paunova, J. Rajkov, D. Kanev.

Post la popola venko je la 9a de septembro 1944 la E-movado en Bulgario komencis revigliĝi, helpata de la popola potenco kaj instigata de la alta pritakso de Georgi Dimitrov pri la valora agado de la bulgaraj e-istoj. Tamen la E-societo en Ĥaskovo longe ne povis reviviĝi. Apenaŭ la 20-an de decembro 1956, ĉi-aŭ iniciato de la veninta en Ĥaskovon aktiva e-isto Georgi Idakiev, en la Urban Komitaton de la Patrolanda Fronto kunvenis kun li la malnovaj e-istoj Lenin Donev, Bina Garti, Stefan Petrov, Delĉo Ĥaralanov kaj Todor Petrov. Ili restarigis la E-societon, kiu akceptis la



nomon de la granda kaj amata de nia popolo sciencisto, sociaganto kaj amiko de E-o, la ĥaskovano prof. d-ro Asen Zlatarov.

Ekde tiu dua naskiĝo en la E-societo komenciĝis nova vivo, agado kaj supreniro. Jam 22 jarojn sub la verda standardo de Zamenhof kaj kun la nomo de sia eminenta patrono la societo laboras por la disvastigo de E-o, por la prospero de la althumanaj ideoj de la E-movado. Ĝi regule organizas kursojn por komencantoj kaj progresintoj, gvidataj en la societa klubejo kaj en multaj lernejoj, sendas homojn al la lernejtendaro en Druĵevo, al la internaciaj e-kursoj en Meden Rudnik apud Burgas kaj aliloke. En la societo elkreskis multaj bonaj kursgvidantoj kiel Miĥail Elenov, Nikola Pipev, Nikola Uzunov, Maria Veleva k.a.

En la klubejo de la societo okazas regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj kun diskutoj, belartaj programoj k.a. La e-istoj de Ĥaskovo partoprenas en la tuturbaj festadoj, manifestacioj, celebroy. Nia E-societo subtenas fruktodonajn ligojn kun amasaj organizaĵoj kiel Komsomolo, Komitato de Pacdefendo. Ĝi aktive partoprenas en ĉiuj aranĝoj de Bulgara E-Asocio: kongresoj, konferencoj, recitaloj, renkontiĝoj ktp. E-istoj de Ĥaskovo regule vizitas ankaŭ la Universallajn Kongresojn de E-o.

Aparte notinda estas la fakto, ke la e-sitoj de Ĥaskovo havas viglan koresponda-

don kun la e-istoj el pli ol 30 landoj. Ankaŭ en la urbo ofte gastas eksterlandaj e-istoj.

En 1969 nia societo kaj urbo estis dommastroj de la IX Festivalo de BEJ, kiun partoprenis pli ol 900 gejunuloj el nia lando kaj gastoj el Francio, Jugoslavio, Sovetunio, Japanio. En 1973 la societo denove estis dommastro de amasa junulara aranĝo — la I-a Nacia Lernejana E-Konferenco kun 300 partoprenantoj.

Ekde la restarigo de E-societo „Asen Zlatarov“ ĝis nun en ĝi elkreskis multaj aktivuloj kaj gvidantoj, iuj el ili estas membroj de la Centra Estraro de BEA. Ĉi tie oni devas menci la nomojn de la unua prezidanto de la restarigita societo Delčo Haralanov, de Luka Valĉanov, Boris Kolev, Nikola Pipev, Nikola Uzunov, Antonia Spasova, Atanaska Papazova k. m. a. Dum ĉi tiuj 22 jaroj aparte elstaras la nomo de Georgi Idakiev. Fordonintsin al la nobla E-movado, Idakiev havas ne nur la meriton de renaskinto de la E-movado en la urbo. Ekde la unua tago li donis malavare ĉiujn siajn fortojn, entuziasmon, energion kaj organizan talenton por ĝia prospero.

E-societo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“ en Ĥaskovo jam estas 75-jara. Unu tuta homa vivo! Sed ĉu oni povas diri, ke nia societo estas maljuna? En sia nuna aĝo ĝi estas pli juna ol ĉe sia naskiĝo, multe pli forta, pli granda, pli vivkapabla.

V a V A R E-79

La Va Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE-79) okazis en Kubrat la 27—28an de januaro. Ĉi-jare ĝi havis karakteron de internacia E-seminario. Tial la lokaj e-istoj organizis ĝin kunlabore kun la Direkcio de Popola Klerigo kaj la Societo por Disvastigo de Sciencaj Konoj „Georgi Kirkov“ sub la aŭspicio de la Urba Konsilantaro de Kulturo.

La urba placo estis feste ornamita per flagetoj, sloganoj kaj la standardoj de la landoj-partoprenantoj en VARE.

Pli ol 150 e-istoj el la distriktoj Ruse, Sofio, Ŝumen, Varna, Târnovo k. a., reprezentantoj de Hungario, ĈSSR kaj Pollando, de la loka kaj distrikta ĵurnaloj, de la loka radioservo kaj aliaj urbaj instancoj eniris la grandan salonon de la kulturdomo.

Solena malfermo. Eksonis la himnoj de Popola Respubliko Bulgario kaj de Esperanto. La prezidanto de la Urba Konsilantaro de Kulturo, k-do Ivan Ivanov, salutis la partoprenantojn en la seminario.

La seminario estis vere internacia. Pri la unua temo — „Esperanto kaj ĝia kontribuo al la monda literaturo“ — prelegis Arpád Aboni el urbo Bekeŝcaba (Hungario). La duan tagon pri la temo „Esperanto kaj la problemoj pri lingva edukado en la ler-

nejoj“ prelegis Ernjo Ĉisar el Varpalota (Hungario).

La tria prelego estis farita antaŭ la aktivularo en la kulturdomo. La preleganto Stano Marĉek el urbo Martin (ĈSSR) forte impresis la aŭskultantojn per sia tre interesa temo — „Esperanto kaj la lingvoj de la grandaj nacioj“.

Dum VARE-79 abundis diversaj programoj. La unuantagon la gastoj travivis neforgeseblajn momentojn, kiam ensemblo de la kulturdomo prezentis riĉegan progra-

La prezidio de VARF—79



VARE KUBRAT BULGARIE 27.1.79



mon. Aparte impresis ilin la danco „kukeri“ kaj la popolkantoj de la ĥoro. Pompaj kostumoj, fantaziaj maskoj, rapidaj ritmoj de la popoldancoj — ĉio ĉi admirigis la publikon.

La sekvan tagon aktorinoj el la Urba Pupteatro prezentis esperantlingve la teatraĵon „La anasido“.

Tagmanĝo — en koketa arbardomo.

Je la 14 horo ĉe la arbardomon venis aŭtobuso por la plej granda grupo el Ruse, Târnovo kaj Ŝumen.

Specialan renkontiĝon de la eksterlandaj gastoj kun la aktorinoj el la Pupteatro organizis la Sindika ta Kulturdomo. Dum la oficiala akcepto la gastoj esprimis bonegajn impresojn pri la pupteatraĵo. La aktorinoj

promesis prepari por la sekva jaro novan E-teatraĵon.

Interesa estis la renkontiĝo de la gastoj el Hungario kaj ĈSSR kun la estraro de la Konsumkooperativo „Narkoop“ — Kubrat. K-do Arpad Aboni, speciala rajtigito de la Hungara Kooperativa E-Komisiono, atente aŭskultis la raporton de la prezidanto de la kooperativo en Kubrat pri la rezultoj de la laboro, planita en la komuna kontrakto de ambaŭ kooperativoj.

Fruktodona estis la 5a VARE kaj por la partoprenintoj, kaj por la E-societo.

Ĝis revido, karaj prelegantoj, gastoj, geamikoj! Ĝis revido dum la 6a VARE, sekvontjare, lastsabate, januare!

Anton Antonov

E-RENKONTIĜO EN DIMITROVGRAD

Honore al la naskiĝtago de Zamenhof en Dimitrovgrad okazis granda renkontiĝo de la lokaj e-istoj kaj ĉ. 80 gesamideanoj el 14 loĝlokoj.

Raporton pri la vivo kaj agado de Zamenhof faris Metodi Gelev. Sekvis belarta programo el ĥorkantoj kaj recitaĵoj. Infanetoj el infanĝardeno „Detelina Minĉeva“ prezentis teatraĵeton „La blanka kokino“.

En restoracio „Panoramo“ okazis amika vespermanĝo, dancoj, amuzado.

Petro Angelov

Esperanto-recitalo en Pazarĝik

La 9an de februaro en la Junulara Domo de Pazarĝik okazis esperantlingva recitalo de la opera artistino Vera Vájarova. Majstre kaj profunde ŝi esprimis en la Internacia Lingvo la plej belajn homajn sentojn, ŝprucantajn el la poezio de Asen Grigorov, K. Kaloĉaj, Marĵori Bolton, Ljuba Bojaĝieva, Penka Papazova, Georgi Mihalkov, Stojan Kostadinov, Prodan Prodanov, Penka Batoeva, Viktor Gonzalez k.a.

Skizon pri la E-poezio kaj prezenton de la poetoj faris Kunĉo Valev, ĉefredaktoro de „BE“.

La esperantista publiko sincere dankis.

R. Georgieva

La E-kurso de P. Pajmakov — Trojan



PLURAJ E-KURSOJ TRA LA LANDO

TRJAVNA. E-societo „Verda Standardo“ malfermis E-kurson por komencantoj, kiun vizitas 15 personoj. La lecionoj okazas en la klubejo de la Urba Konsilantaro de Bulgaraĵoj aŭtomobilistoj. Kursgvidanto — Ivan Gânzov, prezidanto de la societo.

TROJAN. Post la UK de E-o en Varno, kiun partoprenis 53 e-istoj el Trojan kaj ĝia regiono, la intereso al la Internacia Lingvo evidente kreskis. En u. Trojan estis malfermitaj elementaj kursoj en la gimnazio — por 29 gelernantoj, en uzino „Elprom“ — 16 kursanoj, en la gimnazio de v. Vrabevo — 30 lernantoj, en v. Orešak — 7 civitanoj. La kursojn gvidas Pavel Pajmakov, Maja Bâčvarova, Nadka Dankova, Lalju Lalev kaj Ivan Lišev.

La urba E-societo „Balkana Stelo“ havas 82 membrojn. Ĝi kolektis 137 abonojn al „Bulgara Esperantisto“, „Esperanto“, „Paco“, „Heroldo“, „Scienca Mondo“.

L. Lalev

VIDIN. En la urbo funkcias 2 elementaj kursoj.

La unua estas en la gimnazio kun instruado en angla lingvo — ĝin partoprenas 35 lernantoj. Lecionoj — du foje en la semajno. Kursgvidanto — Malina Kamenova, diplomita instruistino de E-o.

La dua kurso funkcias en III-a elementa lernejo. Ĝin vizitas 30 gekursanoj, inter kiuj 10 gelernantoj el diversaj lernejoj kaj 20 civitanoj. Lecionoj — unufoje en la semajno. Kursgvidanto — Georgi Markov.

G. Markov

SVIŠTOV. Ĉio en la klubejo de la E-societo en Svištov estas nova: benkoj, tabloj, seĝoj, la nigra tabulo. Ĉio estas freŝe kolorigita. Ankaŭ bonaj gvidantinoj por la du E-kursoj estas trovitaj — Pepa Ivanova



kaj Lilija Lazarova. La kursanoj estas feliĉaj havi tiajn junajn entuziasmajn instruistinojn.

Mi vizitis lecionon de Pepa Ivanova. Sur la benkoj sidis laboristoj kaj lernantoj, junaj patrinoj kun siaj infanoj k.a. Ili similis birdaron, kiu senpacience flugas al Esperantujo. Sur la vizaĝoj — suno, en la koroj — flamo. Feliĉa estas la bonega pedagogo Pepa Ivanova konduki tiujn diversajajn homojn al io nova — la mondo de la e-istoj, la mondo de la internacia amikeco, ko apreniĝo kaj feliĉo.

Dimitro Denĉev

DOSPAT. La estraro de E-societo „Fajrero“ neniam forgesas, ke la sukcesa E-laboro dependas unufoje de la kursoj. Tial ĝi tre serioze traktis la demandon en speciala kunveno. Estis malfermitaj kaj funkcias:

— por civitanoj en la loka legejo 2 kursoj (1 por komencantoj, 1 por progresintoj);
— por lernantoj en gimnazio „Dimitro Blagoev“ — 8 kursoj (6 por komencantoj kaj 2 por progresintoj).

— El ili po 4 kursoj gvidas Velurina Ĉirpanska kaj Emil Ĉirpanski, po 1 kurso — Nedjalka Petrova kaj Ani Dimitrova.

Estraro de „Fajrero“

AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

Estimataj gesamideanoj.

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano nia E-societo estas komisiita havigi per E-o materialojn por regiona ekspozicio sub titolo „La vivo kaj la revoj de la infanoj en la mondo“. Necesaj estos:

1. Aŭtentikaj fotoj, eltranĉaĵoj k.a. pri diversaj flankoj de la infana vivo — ludoj, festoj, sporto, familia kaj lerneja vivo, infanaj organizaĵoj kaj ties simboloj, flagoj, streboj, iniciatoj.

2. Porinfanaj periodaĵoj.

3. Ilustraĵoj pri infana E-aktiveco.

4. Afiŝoj, gazetartikoloj k.a., dediĉitaj al la Internacia Jaro de la Infano.

5. Laŭeble: infandesegnaĵoj je invidelektitaj temoj.

Ni varme petas vin sendi tiajn materialojn. Ili povas esti en kiu ajn lingvo kun E-traduko. Bonvolu fari tiel, ke la sendaĵo atingu nin ĝis la 20a de majo 1979 j.

Ĉion sendu al: Esperanto-societo „Progreso“, 5180 Polski Trâmbeŝ, Bulgario.

Ĉiu kontribuaĵo estos rekompencita.

SAMIDEANOJ! Via helpo plifortigos la pozicion de la Internacia Lingvo en nia urbo, distrikto kaj regiono. Ni kredas je via esperantista solidareco!

La E-kurso de Pepa Ivanova — Sviŝtov



PLENKUNSIDO DE LA SOFIA DE de BEA

La 28an de januaro en Sofio okazis plenkunsido de la Sofia DE de BEA.

En la komenco estis honorita per la ora insigno de BEA k-do Cano Ignev pro liaj meritoj al la E-movado kaj multjara E-agado.

Pri la ĝisnuna laboro kaj estontaj taskoj raportis Ĥristo Kanev — prezidanto de la Sofia DE, kaj pri la financa stato kaj la buĝeto — Marin Marinov — sekretario de la DE. Ili notis bonajn rezultojn, aparte en la sfero de la ekonomia agado.

Okazis vigla diskutado, kiun partoprenis Veska Nakova, Stefka Markova, Violin Oljanov, Dragan Ŝentov, Stefan Ganĉev, d-ro Stojan Moraresku, Neli Abaĝieva, Nikola Nikolov, Vasil Bozarov, Zahari Ivanov, doc. Balĉev, Vasil Trifonov (Samokov), Maria Angelkova (Godeĉ), Kr. Karucin, Ĥr. Gorov, K. Vălev, Dimitro Terziev k.a. Ĉiuj aprobis la agadon de la DE, donante altan pritakson al ĝi, kaj faris multajn utilajn proponojn kaj rekomendojn por la estonta agado: la DE kontrolu pli regule la laboron de la E-societoj en Sofio kaj la distrikto; la societoj organizu vastan kampanjon por plimultigo de sia membraro; oni antaŭvidu pli da monrimedoj por agitado; la DE aĉetu novajn pli modernajn presmaŝinojn; apartan zorgon la DE kaj la societaj estraroj havu pri la infanoj kaj la junularo — E-o devas vaste penetri ilin; oni laboru ankaŭ kun la gepatroj de la infanoj por varbi inter ili amikojn de E-o; oni pli ofte aperigu E-materialojn en la gazetaro; estu organizita seminario por kursgvidantoj; oni streĉu la fortojn por penetri en fabrikojn, entreprenojn, oficejojn — tie ekzistas multe pli favoraj materialaj kondiĉoj por E-laboro; oni rompu la fermitecon kaj la izolitecon de iuj E-societoj kaj DE kaj komencu vastan agadon kune kun la aliaj amasorganizaĵoj; oni laboru enkadre de la interfratiĝintaj kun eksterlando loĝlokoj; E-o ekservu pli intense la praktikajn bezonojn de la apartaj homoj, laborkolektivoj, sciencaj institutoj ktp; oni subtenu finance pli viglan reklamon de niaj E-kursoj — ĉeestaj kaj korespondaj; oni donu pli grandan fidon al la junularo, altiru ĝin

(S r p. 15)



Juna esperantisto

IV LANDA MEZLERNEJANA E-KONFERENCO KAJ REVUO DE LA E-KANTO KAJ ARTPAROLO

La 2—3 de februaro en urbo Jambol okazi la IV Landa Mezlernejana E-Konferenco kun Revuo de la E-Kanto kaj Artparolo. Ilin partoprenis 250 junaj geesperantistoj el mezlernejoj el la urboj Petriĉ, Blagoevgrad, Vraca, Dospat, Dimitrovgrad, Haskovo, Kazanlâk, Ŝumen, Gâlâbovo, Jambol.

La 2-an vendrede okazis vesperamuzo en la sporta halo „Diana“. Ludis estrada orkestro el la urbo-dommastro, kiu amuzis kaj dancigis la junularon. La okazigitaj kvizo pri la E-movado kaj tombolo variigis aldone la vesperon. Por la dancemuloj oni aranĝis konkurson pri plej bone dancanta paro.

La sekvan tagon antaŭtagmeze komenciĝis la Konferenco. En la prezidio okupis lokojn la k-doj Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, Dimitro Papazov — sekretario de BEA kaj prezidanto de BEJ, Evgeni Georgiev — estrarano de BEJ, Bojĉo Mladenov — gvidanto de la mezlernejana grupo el Vraca, Emil Ĉirpanski — gvidanto de la grupo el Dospat, Dimo Trudoljubov — prezidanto de la DE de BEA en Jambol. La tagordo de la Konferenco inkluzivis: koncizan informon de Evgeni Georgiev pri la 34-a IJK en Veliko Târnovo, intersanĝo de spertoj inter la mezlernejanaj E-grupoj kaj distingon de aktivuloj. Pri la spertoj kaj iniciatoj de siaj E-societoj kaj grupoj parolis Iliana Ljubomirova el Vraca, Miroslava Nedelĉeva el Jambol, Elena Kinova el Petriĉ kaj Marko Anov el Gâlâbovo. K-do Dimitro Papazov distingis aktivulojn-mezlernejanojn per medalo „Aktiva Membro“ kun portilo kaj E-libro.

La Revuon de la E-Kanto kaj Artparolo malfermis la anoncantoj Daniela Vârbanova kaj Ljubomir Trifonĉovski el urbo Vraca. La prezidanto de la ĵurio k-do Kunĉo Vâlev prezentis la postulojn kaj pritakso-manieron. La revuo komenciĝis per plenumoj de

*La kolektivo de Dospat kun sia gvidanto
Emil Ĉirpanski*



vokala-instrumenta grupo el Petriĉ. Sinsekve prezentigis partoprenantoj el Vraca, Haskovo, Blagoevgrad. Per variaj komunaj programoj partoprenis la grupoj el Dospat kaj Jambol.

Dum la ĵurio kunsidis pri la finrezultoj estis paŭzo, en kiu k-do Prodan Prodanov — artisto el la Muzika Teatro „Stefan Makedonski“ — Sofio, akompanante sin per bangogitaro, plenumis E-kantojn.

La rezultoj de la revuo anoncis k-do Vâlev. K-do Papazov, notinte la sukceson de la Konferenco kaj la Revuo, fermis la aranĝon.

Sekvis prezento de krono antaŭ la monumento de G. Dimitrov kaj komunaj fotoj.
Evgeni Georgiev

PREMIITOJ EN LA REVUO

ARTKOLEKTIVOJ

I premio: kolektivo de gimnazio «D. Blagoev» — Dospat

II premio: ne aljuĝita

III premio: Septeto de lernantinoj el Blagoevgrad

RECITANTOJ

I premio: Miroslava Nedelĉeva — Jambol

II premio: Galja Georgieva — Jambol

*III premio: Daniela Vârbanova — Vraca
Didi Uzunova — Jambol
Ani Raŝinova — junpionirino
el Dospat*

VOKALAJ GRUPOJ

*I premio: Kolektivo el Petriĉ
Trio el Dospat (solisto Fedja
Trampov)*

*II premio: Junpionira grupo el lernejo
«Šandor Petjofi» — Haskovo*

INDIVIDUAJ KANTOJ

*I premio: Mitoŝka Stojanova — Jambol
Instigo: Boris Ĥristov — Jambol (piano)*

Alberto Ajnŝtajn pri Esperanto
*(lige kun 100 jaroj ekde lia naskiĝo —
14. III. 1879)*

Por la internacia komunikado la internacia kompreniĝo helpe de internacia lingvo ne estas nur neceso, sed ankaŭ memkomprenebla afero.

Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo pri lingvo internacia.



TRA LA E★ MONDO

64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

EL „OFICIALA KOMUNIKO № 3“

Lucerno, Svislando, 1979, 07.29-08.04

Konstanta adreso: Nwe. Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Denove poŝtmarko pri UK. La svisa poŝto eldonos specialan poŝtmarkon pri la 64a UK kun bildo de la svisa varmaera balono. La poŝtmarko, kiu aperos en kvanto inter 10—15 milionoj, havas valoron de 0,70 sv. fr. Tio estos la kvara E-poŝtmarko, eldonita de kongreslando okaze de UK. La antaŭaj tiaj poŝtmarkoj aperis en Jugoslavio (1953) kaj Bulgario (1963, 1978).

Piron rektoro de ISU. Rektoro de la 32a sesio de Internacia Somera Universitato estos la E-verkisto Johān Valono, konata ankaŭ kiel Claude Piron.

Lingvoj kaj organiziĝo. Dum sia januara kunsido la Estraro de UEA fiksas la temon de la 64a UK: „La lingva aspekto de internacia organiziĝo“.

Svisa Radio ĉiutage. Dum la kongresa semajno la Svisa Radio elsendos ĉiutage en la Lingvo Internacia, same kiel ĝi faris dum la 32a UK en Berno (1947), kiam komenciĝis la svisaj E-elsendoj.

Blinduloj samtempe. La 47a Internacia Kongreso de Belindaj Esperantistoj okazos samsemajne kaj samurbe kun 64a UK. Hotelo „Union“ en Lucerno estos la ĉefa kongresejo.

(El p. 13)

al la gvidaj organoj de la Movado, ŝanĝu la ofte renkontatan stilon de kuratoreco super la junularo; estu preparita bonkvalita, efika afiŝo pri E-o; lernolibrojn kaj vortarojn oni eldonu ĉiam en pli granda kvanto, ĉar ili neniam sufiĉas; DE aĉetu aŭtobuson ktp. ktp.

Fine la plenkunsido akceptis kelkajn organizajn ŝanĝojn en DE: kreiĝas du fakoj de laboro — por la ĉefurbaj E-societoj kaj por la distrikto de Sofio.

DELEGACIO DE UEA AKCEPTITA DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

Dum mallonga restado inter du eksterlandaj vojaĝoj la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, akceptis en sia oficejo en Parizo kvarpersona delegacion de UEA la 8-an de januaro.

Gvidis la delegacion la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin. Partoprenis ankaŭ s-ro Emmanuel Chicot, la oficiala reprezentanto de UEA ĉe UNESKO, s-ino Barbara Despiney, reprezentanto de TEJO ĉe UNESKO, kaj s-ro Pierre Guérout, ano de la laborgrupo de UEA pri kunlaboro kun UNESKO.

Dum la duonhora konversacio la delegacio havis okazon ĝisdatigi la scion de la Ĝenerala Direktoro pri la progreso de la E-movado kaj UEA kaj esprimi sian deziron, ke UNESKO pli sisteme esploru la malhelpojn al la baza, interpersona komunikado.

S-ro M'Bow konsentis, ke tiu baza komunikado estas ege grava. Ĝia manko en nia moderna teknologia socio kaŭzas ĉie paneojn kaj perfortojn. „En kelkaj tradiciaj socioj, — li asertis, — la komunikaj kanaloj pli bone funkcias ol en teknologiaj socioj“.

La delegacio informis s-ron M'Bow pri la rezultoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Varno en 1978 kaj pri la preparlaboroj por la Kongreso en Lucerno en 1979. La Lucerna Kongreso pritraktos kiel ĉefan temon la lingvajn aspektojn de internacia organiziĝo.

S-ro M'Bow jam konas niajn Universallajn Kongresojn: li mem prezentis la enkondukan paroladon en la 62-a Universala Kongreso en Rejkjaviko en 1977. „Sed tie, — li diris, — mi havis komplekson. Mi ne esprimis min en Esperanto.“ (Efektive, lia parolado estis en la franca, kun skribita traduko.) „Se eventuale mi ĉeestus alian vian kongreson, — li aldonis, — mi dezirus paroli en Esperanto.“

Post la plenkunsido en Sofio



KIU ESTAS AMADOU-MAHTAR M'BOW?

Faktoj pri la Ĝenerala Direktoro de UNESKO

S-ro Amadou-Mahtar M'Bow (Amadu Mahtar M'Bou), la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kiu partoprenis kaj parolis en la Solena Inaŭguro de la 62-a UK en Rejkjaviko, estas la unua afrikano elektita al la plej alta pozicio en la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Edukado, Scienco kaj Kulturo. Li estis elektita por sesjara oficperiodo en novembro 1974.

S-ro M'Bow naskiĝis la 20-an de marto 1921 en Dakaro, la ĉefurbo de nuna Senegal (Okcidenta Afriko). Li studis en Parizo kaj instruis ekde 1951 kiel profesoro pri historio kaj geografio en Maŭretanio, poste en Senegal. En 1957 li estis kulturministro de la ĵus sendependiĝinta Senegal, en 1966 li iĝis edukministro, en 1968 ministro pri junularo kaj kulturaj aferoj. En 1970 s-ro M'Bow estis nomita Direktoro de la Eduka Fakto de UNESKO. En tiu ofico li pledis kaj aktivis precipe por la realigo de la rajto je edukado kaj por la reformo de la edukistemo en la industria kaj evoluantaj landoj.

Kiam s-ro M'Bow transprenis sian oficon kiel Ĝenerala Direktoro de UNESKO, li diris: „De nun mi estas civitano de ĉiu lando, servanto al ĉiuj membro-ŝtatoj!“ Sian elektiĝon li nomis „paŝo antaŭen“ en la direkto al malkonstruo de antaŭjuĝoj, kiuj ludis tragikan rolon en la historio de la mondo. „Mi konsideras mian elektiĝon kiel signon de rekono kaj respekto al la regionoj kaj popoloj en la Tria Mondo, kiuj tiel longe estis malhelpitaj partopreni en la farado de universalaj decidoj kaj sentebliĝi sian influon.“

Kiel montris la ĝisnuna aktivado de la Ĝenerala Direktoro, kaj kiel li mem deklaris dum la Inaŭguro, li dediĉas tre fortan atenton al la problemaro de internacia komunikado. Des pli atentinda do estas lia vizito al la Universala Kongreso — evento, kiu en la historio de la rilatoj inter UNESKO kaj UEA havas precedenton nur en la fama rezolucio de UNESKO pri Esperanto en 1954 j.

„50 JAROJN INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO“

Tio estas la titolo de la ekspozicio, malfermita la 2-an de januaro en unu el la salonoj de IEM en Vieno lige kun ĝia 50-jara jubileo. Ĉeestis la ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La ministeria konsilisto d-ro Jozef Lessner - Spritzenberg el la Ministerio de Scienco kaj Esplorado inaŭguris la ekspozicion per mallonga parolado. La historia materialo (fotoj, dokumentoj, libroj, aŭtografaj kaj plej diversaj esperantaĵoj) estas ordigita en 12 grupoj. La ekspozicio estos malfermita dum la tuta jaro.

El «Informilo» de IEM, 1/1979

KONCIZE

— La 15. 10. 1978 Radio Aŭstralio en sia kroniko „Eltiraĵoj el gazetaro“ disaŭdigis leteron de s-ino M. Elyard pri la 63-a UK en Varno.

— La 15. 10. 1978 Radio France Inter elsendis kun kanzonista programo kanton kun refreno „La solvo estas Esperanto“.

— La 28. 10. 1978 oni parolis en la Itala Televido pri kaj en E-o. Temis pri la programo „Eŭropaj Tagoj“. Oni parolis pri la Itala propono enkonduki E-on en la Eŭropan Parlamenton. I. a. en la programo partoprenis Renato Corsetti, H. Tonkin kaj W. Auld.

— La 15. 11. 1978 oni denove parolis pri E-o en la Itala Televido.

— En oktobro la Beograda Televido dufoje prezentis duonhoran filmon pri la Internacia Lingvo.

— La E-elsendoj de la Portugala Nacia Radio estas momente la plej klare aŭdeblaj E-elsendoj en Norda kaj Centra Ameriko. Notinde estas, ke la tempon por tiuj elsendoj oni forprenis de la anglalingvaj elsendoj.

— En la libera Trenta Universitato (Italio) 130 instruistoj partoprenis specialan kurson, rajtigitan de la Ministerio pri Publika Instruado, laŭ la temo „Komerca geografio, Esperanto kaj apartaj konsideroj al komunikaj rimedoj“.

— La Venezuela E-Asocio ricevis inviton ekde oktobro 1978 starigi oficialan kurson de E-o en la Universitato „Simon Bolivar“ en Caracas.

— „Esperanto kaj la interlingvistiko en Svislando“ estas la temo de aranĝita granda ekspozicio en la Nacia Biblioteko en Bern.

— Internacia E-Klubo Aŭtomobilista nombras pli ol 1150 anojn el 35 landoj.

— Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj kolektis jam 360 adresojn de uzantoj de E-o en multaj landoj, Adreso: K. Sly, 200 Nevells Rd., GB Letchworth, Herts., SG 6, 4TZ, Britlando.

GRAVA!

Abono al „Bulgara Esperantisto“ ankoraŭ eblas. Kolektu kaj grupe sendu abonkotizojn!

PACO

Teksto: Georgi Mihalkov

Muziko: Šehrie Efendieva

Marŝo

Pa-co gran-da vor-to fe-ra vor-to!
 Por-tas vi li-be-ron, su-nan. Vi lu-mi-gas tu-tan mon-don, don, ka-ra es-tas
 vi-a he-la lu-mo. Pa-co, las-ta ho-ro nun al-venas.
 Vi-das mi, mi fir-me kre-das: en la be-la mon-do vas-ta post ba-ta-lo lon-ga
 fi-ne vi a-pe-ros, fi-ne vi a-pe-ros.

Paco — granda vorto, fera vorto!
 Portas vi liberon, sunon.
 Vi lumigas tutan mondon,
 kara estas via hela lumo.

Refreno:

Paco, lasta horo nun alvenas.
 Vidas mi, mi firme kredas:
 en la bela mondo vasta
 post batalo longa fine vi aperos.

„Paco!“ — la patrinaj lipoj flustras
 kun espero kaj tenero.
 Dolĉe dormas la infanoj
 sub la helaj steloj de l'ĉielo.

Paco — freŝa pluvo por la floroj!
 Paco — kanto vi patria!
 Oraĵ grenoj, kampoj verdaj!
 Paco — gaja, juna vivo mia!

Flugu, flugu, kanto, ho ne haltu!
 Ĉesu sangaj, bestaj dramoj!
 Luktas miaj bravaj fratoj.
 Regos en la mond' libero, amo!

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ NASKITAJ EN MARTO

La popolo kaj la kronitaj kapoj — tio estas nepacigeblaj malamikaj tendaroj.
 Kiu vidas la malbonon kaj abomenas ĝin, sed ne batalas por ĝia neniigo, sendube havas multe pli grandan pekon ol tiu, kiu pro anima blindeco apogas per ambaŭ manoj tiun malbonon.

Aleksandro Stambolijski (1. III. 1872—14. VI. 1923)
 Ĉiu homo posedas rezervon da fortoj, kiujn li mem ne konas; metu lin en neceson manifesti ilin, kaj li faros la nekredeblan.

La laboro estas lernejo por la karaktero.

Ne sufiĉas lerni ion, oni devas finlerni ĝin.

Ne kutimiĝu al facila ekscitiĝo, sed al facila sindeteno.

La obstineco ofte anstataŭas la genion.

La plej malbona decido, kiun oni povas preni, estas nenion decidi.

Kio estas la suno por la kampo, tio estas la laŭdo por la koro.

La trankvileco estas braveco.

Boris Drangov (14. III. 1872 — 26. V. 1917)
 El „Memoru la militon“

INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO APUD SMOLJAN

La nova domo de la Internacia E-Kursejo apud urbo Smoljan funkcias regule ĉiam la tuta jaro escepte de aprilo kaj novembro. La kursoj estas du-semajnaj kaj ĉiu komenciĝas la 1-an kaj 16-an tagon de la monato.

La partoprenkotizo en levoj por du semajnoj estas:

	Por eksterlandanoj	Por bulgaroj
1. En apartamento	168	105
2. En dulita ĉambro	140	91
3. En trilita kaj kvarlita ĉambro	126	84
4. En ses kaj oklita ĉambro	112	77
5. En tendoj	98	70

La partoprenkotizo inkluzivas: mangadon trifoje tage, noktadon, kurson de E-o, amuzvesperon kun speciala orkestro kaj diskoteko, sportludojn, busekskursojn al Trigrad (la groto kaj la subtera rivero), Pamporovo (per lifto al montopinto „Sneŝanka“), Smoljan (la etnografia muzeo kaj la planedario), Momčilovci (la pentrista galerio kaj la muzeo) ka. Regule funkcias trinkejo sen alkoholaĵoj.

Por la kuranta jaro jam estas fiksitaj du grupoj:

1—14.07 — Internacia Esperanto-tendaro por gelernantoj (11—14-jaraj)
16—29.07 — Internacia Esperanto-tendaro por mezlernejanoj (15—18-jaraj)

Eblas ĉiam ricevi alacnajn servojn. Ekzemple oni povas plilongigi la restadon en Sofio (du tagnoktojn busvojaĝe al Smoljan kaj reen) kontraŭ al-dona pago po 50 levoj persone.

Restado ĉe la Nigra Maro en ripozejo Albena kostos por eksterlandanoj 160 levojn, por bulgaroj — 110 levojn dum la periodo 16.06—15.09, dum la cetera tempo — 150 kaj 100 lv.

Aligdatoj: por grupoj — tri monatojn pli frue, por apartaj personoj — unu monaton pli frue. **Adreso: Internacia Esperanto-Kursejo, 4700 Smoljan, Bulgario.**

FORPISIS EŬGENO SALNIKOV (1907-1979)

Fine de februaro en Moskvo forpasis d-ro Eŭgeno Trofimoviĉ Salnikov — prezidanto de la Moskva Internacia E-Klubo.

Esperanton li ellernis memstare en 1922 kaj fariĝis aktiva membro de SEU kaj SAT. En 1959 li kune kun d-ro K. A. Lavrentiev kaj aliaj esperantistoj-medicinistoj organizis E-kursojn ĉe Kulturdomo de Medicinistoj, kiu poste estis reorganizita en MIEK. Ĝia senĉesa prezidanto ĝis sia lasta tago estis d-ro Salnikov.

En 1963 li partoprenis la 48an UK de E-o en Sofio. D-ro Salnikov partoprenis aktive en la ĝenerala soci-politika kaj scienca vivo.


Multaj bonaj faroj por E-o, obstina laboro por firmigo de la internacia amikeco kaj tutmonda paco estos la plej bona monumento de nia kara Eŭgeno Trofimoviĉ!

Grupo de sovetaj geamikoj

FORPISIS BORIS VELIĈKOV

K-do Boris Veliĉkov el Sofio estis konata al kelkaj generacioj de bulgaraj e-istoj en la cefurbo kaj la lando. Disciplinista, akurata, ĉiam preta plenumi ĉiun taskon, kiun la E-movado komisiis al li. Kio al li estis ne unufoje, ne en apartaj momentoj, tia li estis ĉiam. Boris estas inter tiuj, kiuj faris plejmulton por la konstruo de monto-

domo „Esperanto“ sur Vitoŝa. Li laboris senbrue, modeste, sed plenkonscie. Kaj ĝis sia lasta spiro restis optimisto, pri la estonteco de Esperanto.



La hela ekzemplo de Boris Veliĉkov ĉiam inspiras nin al laboro por Esperanto, por la internacia amikeco kaj kompreniĝo, por la paco.